

ESPERANTO PLUVIVIGAS SIN ĈEFE PER LA KREDO JE MITOJ KAJ LEGENDOJ

Konsideraĵo laŭ la ekzemploj „Lingvo de paco“ - „Lingvo de daŭripovo“
- „Interlingvistiko influis aliajn fakojn“

Kiel la Esperanto-propagando ruinigis Esperanton kaj la Esperanto-movadon

Ekde la komenco la Esperanto-movado disvastigis plej diversajn (dubindajn) asertojn je propra favoro, kiuj fariĝis ĝiaj integraj mitoj kaj legendoj, kiuj estis ĉiam denove ripetataj de la Esperanto-propagando, tiel ke la esperantistoj (kaj kelkaj aliaj) komencis eĉ kredi ilin: lingvo de solidareco, lingvo de amikeco, lingvo de amo, lingvo de paco estis ĉefaj sloganoj, kiuj estis rektaj aŭ malrektaj interpretoj de la Zamenhofa humanisma verko, kiuj poste formis la firman bazon de la Esperanto-ideologio aŭ -filozofio. Tiujn mitojn kaj legendojn eĉ adoptis seriozaj sciencistoj de ekster la Eo-movado, kiuj simpatiis kun Esperanto kaj, baziĝante sur la Esperanto-„fakliteraturo“, tro rapide ankris ilin en siaj verkaĵoj (kiuj estis akceptitaj kiel disertacioj), sen pripensi pli profunde kaj kritike, ĉu tiuj asertoj estas science reprezentablaj. Tiel Esperanto vivis kaj pluvivigis sin krom per la lingvo mem, precipe per mitoj kaj legendoj, kiuj perfekte taŭgis por propagandaj celoj. Unu el la konataj propagandistoj, kiu inventis plej diversajn asertojn por pravigi kaj mistifiki Esperanton, estis la belgdevena sviso Claude Piron.¹ Sed ankaŭ la tuta gildo de „esperantologoj“ kaj „interlingvistoj“ kreis paralelan areon, en kiu oni flegadis kaj pluevoluigis tiujn mitojn kaj legendojn sur „scienca“ bazo.

Al tiuj klasikaj mitoj kaj legendoj apartenis i.a. la laŭdira facileco de Esperanto (16 reguloj kun facilaj gramatiko kaj fonetiko konvenaj ankaŭ por azianoj pro la izola karaktero de Eo, ktp.),² propedeŭtika valoro de Esperanto kaj ĝia rolo kiel traduklingvo, Esperanto kiel solvo de la internacia lingva problemo, lingva neŭtraleco, ktp. ktp. Intertempe tiuj atutoj de Esperanto estis parte pridubataj aŭ eĉ kontestataj de pli kritikaj lingvistoj kaj sociologoj, sed ilia influo estis praktike nula, ĉar la e-istoj obstine kontraŭstaris, rifuzis, kondamnis kaj ignoris ilian kritikon kaj anstataŭ resti modestaj, realismaj kaj raciaj inventis novajn mitojn kaj legendojn.

La plej fanatikan fazon la propagando de tiuj mitoj kaj legendoj Esperanto kaj ĝia movado atingis post la dua mondmilito, kiam Esperanto fariĝis internacie pli konata kaj populara kaj iusence ĝuis la agnoskon de Unesko, kiu emfazis en la fama rezolucio IV.1.4.422 de Montevideo (1954) „la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo“ kaj rekomendis al la registaroj de la mondo „sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo ...“.³

Kiam post la falo de la komunismo fine de la 1980aj kaj komence de la 1990aj jaroj Esperanto kaj ĝia movado alfrontis gravan ekzistan krizon, oni devis reagi per novaj, efikaj pravigoj por savi la aferon, kiu estis minacata de malapero de la surfaco – precipe en la orienteŭropaj landoj, kie Esperanto estis iom populara kaj nun komencis perdi sian signifon samtempe

¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Claude_Piron.

² En Hungario la slogano pri la facileco de Esperanto en multaj kazoj kaŭzis groteskan fiaskon, ĉar la studentoj, kiuj intencis ekzameniĝi en Esperanto, subtaksis la seriozecon de tiu lingvo-ekzameno kaj malsukcesis. Vd. ankaŭ pn. 33.

³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/UNESKO-Rezolucio_IV.1.4.422_de_Montevideo_pri_Esperanto_1954. La sukceso de la adopto de tiu rezolucio estis dankinda al la klopodoj de UEA kaj precipe de ĝia estrarano prof. d-ro Ivo Lapenna, kiu kunordigis kelkjaran unikan internacian propagandan kaj petician kampanjon en UN-, Unesko- kaj NRO-medioj.

kun la falo de komunismaj reĝimoj, de kiuj la ekzisto de la Eo-movado plenplene dependis. En tiu okazo miksiĝis plej diversaj asertoj, mitoj kaj legendoj, lingvistikaj kaj eksterlingvaj.

La duman kulminon de la kreado de mitoj kaj legendoj pri Esperanto eble formis la t.n. „Manifesto de Prago“ (1996), kiu enkondukis asertojn kiel „Esperanto estas demokratia lingvo“, la Esperanto-movado estas movado de „transnacia edukado“, movado de „efika lingvo-instruado“, movado de „lingvaj rajtoj“, movado por „lingva diverseco“, „homa emancipiĝo“ ktp. Tiuj principoj estis konsiderataj de la aŭtoroj „esencaj por justa kaj efika lingva ordo“. Okulfrappe estas, ke en la Praga Manifesto mankis esencaj nocioj de la tradicia Eo-propagando kiel „paco“ kaj „homaj rajtoj“.⁴ Ĉu oni forgesis aŭ intence evitis ilin? Kvankam miloj da homoj subskribis tiun manifeston, kiu estis tradukita al multaj nacilingvoj, ĝiaj pseŭdosciencaj hipotezoj (ankaŭ la vorto „scienco“ mankis) estis tro evidentaj kaj restis malatentataj teoriaj asertoj sen substanco kaj probable sen konkretaj sekvoj, kvankam ĝiaj verkintoj ŝajne estis konvinkitaj, ke en la praktiko ili estas jam delonge pruvitaj.⁵

Certe, ĉiu e-isto havas sian individuan personan opinion pri tiu aŭ jena temo, sed ŝajnas, ke la mitoj kaj legendoj de Esperanto ligas grandparton de la movado de e-istoj, kiuj danke akceptas novan miton kaj legendon, eĉ se tia aperas kiel nesufiĉe kredinda argumento.

Al la kolekto de ĝisnunaj mitoj kaj legendoj, kiuj tiel profunde enradikiĝis en la konscio kaj konserviĝis en la memoro de e-istoj kaj nee-istoj, plej aktuale aldoniĝis nova elemento: Daŭripovo.

Sed unuavice ni revenu al la ĉefa mito kaj legendo „Esperanto kiel lingvo de paco“.

„Lingvo de paco“ (kaj la maldekstrismo de la Esperanto-movado)

Unu el tiuj neelsarkeblaj mitoj kaj legendoj de la Esperanto-movado, kiu similas al miksaĵo inter speco de religia sekto kaj (radikala reakcia maldekstrema) politika partio, montrante skizofreniajn,⁶ paralelsociajn trajtojn, estas, ke Esperanto estas „lingvo de paco“. La vero estas, ke en la realeco la Esperanto-movado, unuavice ĝia ĉefrepresentanto UEA (kaj ties Landaj Asocioj), kontribuis nenion esencan, konkretan aŭ signifan al la monda paco mem nek al la starigo de pli justa internacia ordo, nek al la evito de militoj aŭ al la defendo de la homaj rajtoj, ktp., kvankam ĝi kredas, ke ĝi faris tion aŭ havas tiajn meritojn.

Povas esti, ke la ideo de la internacia planlingvo, precipe Esperanto, iusence estas ideologie ligebla al la pacideo, pacagado, pacismo, kvankam la Esperanto-movado ne vere partoprenis la („oficialan“) internacian pacmovadon kaj ne estas oficiale agnoskita de ĝi kiel integra parto de la pacmovado. La Eo-movado ĉiam volis ludi propran rolon kaj ne tro emis kunlabori kun aliaj organizaĵoj de la civilsocio, pro kio la Eo-movado restis izolita en la „ekstera mondo“. La pacismaj karaktero kaj memkompreno de la Eo-movado plej forte manifestiĝis en la tempo ĉirkaŭ la unua mondmilito, precipe en la vivotempo de L.L. Zamenhof, kaj post la dua mondmilito – sub komplete aliaj kondiĉoj – en la komunisme regataj landoj.

La aserto pri Esperanto kiel „lingvo de paco“ do estas nura ideologia fikcio, ĉar en la praktiko ĝi havis neniun konkretan formon (krom escepte eble en la kazo de e-istaj helpservoj dum ambaŭ mondmilitoj). La Eo-movado ankaŭ neniam ricevis iun pacpremion kiel referencon,

⁴ La vorto paco cetere mankas ankaŭ en la Statuto de UEA.

⁵ Vd. https://eo.wikisource.org/wiki/Manifesto_de_Prago_de_la_movado_por_la_internacia_lingvo_Esperanto, <https://lingvo.org/prago>.

⁶ Al tio apartenas simptomoj de megalomanio (rilate al la propraj graveco kaj signifo), paranojo (rilate al la angla lingvo), perturbita rilato al la realeco, „nenormala“ pensado (malobjektiva analizado kaj falsa konkludado), fanatika konduto, ktp.

pri kiu la e-istoj esperis, kio indikas, ke la Eo-movado ne ĝuis la oficialan agnoskon kiel instrumento de la paco aŭ homaj rajtoj. Nur aserti enkonduko Eon kaj vi havos la „surteran pacon” ne sufiĉas kiel serioza argumento. La „monda” aŭ „surtera paco” dependas de tute aliaj faktoroj ol lingvaj aŭ lingvistikaj kaj ankaŭ ne estas solvebla per la enkonduko de Eo aŭ alia „neŭtrala” internacia planlingvo.⁷

La Eo-movado parte fariĝis komplico kaj apogilo de diversaj diktaturaj reĝimoj kaj politikaj sistemoj, kiuj unuflanke montris iun favoron al Eo, sed aliflanke grandskale subpremis la civilsociojn kaj sistemece lezis la homajn rajtojn (kiel ili estis difinitaj en la UN-Ĉarto kaj aliaj universalaj homrajtaj referencoj). En la t.n. socialismaj landoj de Kubo ĝis Ĉinio kaj precipe en Eŭropo ekzistis aparte multaj vervaj “pacbatalantoj” aŭ “pacapostoloj” inter e-istoj, kiuj furore propagandis la pacismon de la komunismaj partioj, ĉefe kontraŭ la Okcidento, Usono, kapitalismo kaj la („kultura hegemonio” de la) angla lingvo.⁸ En la sovetia bloko la nocio de la paco estis misuzata por la ideologia kaj politika propagando kontraŭ la „militema” kaj „agresema” „klasmalamiko” (paco estis uzata kiel sinonimo de socialismo kaj inverse), dum la pacideo de Esperanto mem samtempe estis krude uzurpita de la komunismaj strukturoj en ilia senco por la propra pacpropagando en la t.n. socialismaj ŝtatoj, gvidataj de Moskvo.⁹ La socialismo en tiuj landoj estis, kiel sciante, aplikata laŭ la marksisma-leninisma kaj /post-/stalinisma linio (kiu en Okcidento estis kritikata kiel krima kaj „maljureca” sistemo). Sed ankaŭ en la Okcidento ekzistis ne malmultaj simpatiantoj de la komunismo (aŭ socialismo aŭ marksismo aŭ kio ajn) kaj ties parencaj fluoj. Fifama estis la politika (protest-)movado de la Maldekstro, kiu estis suspektata kiel komplico de Moskvo kaj de la komunismaj landoj, konsiderata kiel malamiko de la Okcidento kaj kontraŭbatalata en diversaj „burĝaj” landoj, precipe en Usono kaj FRG, kaj en la faŝismaj dekstraj armeaj diktaturoj, kie la komunistoj estis rekte persekutataj kaj mortigitaj, ekzemple en Turkio, Ĉilio, Indonezio, Grekio, Irano). Ankaŭ multaj e-istoj de diversaj landoj apartenis/as aŭ estis/as ligitaj al tiu maldekstra politika branĉo, diversmaniere laŭ grado de la radikaleco. Tiu maldekstra sinteno klarigas la fortajn kontraŭ-usonismon, kontraŭ-anglismon, kontraŭ-okcidentismon, kontraŭ-kapitalismon (kaj anticionismon) en la Eo-movado. Logike, multaj okcidentaj maldekstruloj aŭtomate simpatiis kaj aliancis kun siaj komunistaj Eo-kolegoj trans la blokoj, ekzemploj abundas, kvankam ekzistis ankaŭ reciprokaj suspektoj kaj malfido. Dum la Malvarma Milito la revuo *Esperanto* de UEA kaj aliaj Eo-organoj de asocioj ligitaj kun la UEA-sistemo (kiu mem estis gvidata de diversaj maldekstraj fortoj) neniam levis sian voĉon aŭ proteston kontraŭ la lezitaj homaj rajtoj ie ajn, plej laste en la orienta bloko mem, aŭ en Irano, kie la Eo-movado iom furoris kaj ‘ĝuis’ ŝtatan apogon. Tiun silentadon oni pravigis per la t.n. politika neŭtraleco de la Eo-movado, kvankam ĝi estis altgrade hipokrita. La entuziasmo en Eo-medioj pri tiu ŝtata apogo inter Kubo kaj Ĉinio estis grandega. Kiel mi klarigis en aliaj artikoloj, tiu „ŝtata apogo” havis altan sociopolitikan prezon por la Eo-movado, kiu restis tabua en ĝi, precipe en la komunismaj landoj mem, kie tiu problemo ne povis estis publike traktata. Ĉi tiu prezo signifis la totalan perdon de la asociaj libereco, sendependeco kaj privateco. En la komunismaj kaj multaj aliaj landoj, kie ekzistis drasta politika subpremado de opoziciuloj, kie regis diktaturo de unu politika partio, kiu toleris nenies alian politikan opinion, kritikantoj estis rapide silentigitaj, minacitaj kaj ekskluditaj. Kvankam la ĝenerala homamaso respektis la leĝajn regulojn kaj sekvis la vali-

⁷ Pli detale vd. http://www.planlingvoj.ch/13_HIPOTEZOJ_PRI_ESPERANTO_2012.pdf, punkton 6.

⁸ Per tio mi neniel celas aserti, ke la „Okcidento” konsistis/as nur el „anĝeloj”, aŭ absolvi ĝin de ĉiuj pekoj en la historio, ekz. persekutado, subpremado kaj mortigado de indiĝenoj en Ameriko, Afriko kaj Azio, imperiismo kaj koloniismo, faŝismo en Italio kaj naziismo kaj holokaŭsto en Germanio, rolo de la katolika eklezio rilate al la judoj kaj „paganoj”, militoj de Usono en Koreio, Vjetnamio, Irako, Afganio ktp. Ĉiuj tiuj aventuroj cetere finiĝis en totala fiasko. La diferenco estas: Dum la „Okcidento” pli malpli konfesis siajn historiajn erarojn kaj ŝajne lernis el ili (sen garantio, ke oni ne refalos), la monda komunismo, kiu respondecas por ĉ. 100 milionoj da (mort)viktimoj en sennombraj landoj, kie ĝi estaliĝis en la 20a jarcento, neniam faris kritikan bilancon. La Eo-movado neniam kritikis tiujn krimojn de la komunismo, dum ĝi aŭ unuopaj reprezentantoj de ĝi konstante polemikis kontraŭ la Okcidento, Usono ktp.

⁹ Ĉi tiun temon mi traktis aliloke en mia artikolaro publikigita sur www.planlingvoj.ch.

dan politikan ordon kiel obeemaj ŝafoj sub la severaj observado kaj kontrolado de partiaj membroj, kiuj gvidis la Eo-asociojn, tamen ekzistis kelkaj membroj, kiuj konsciis pri la problemoj, sed ne kuraĝis aŭ rezignis elpaŝi publike. Neniu volis havi konflikton kun la polico kaj justico aŭ eĉ esti arestita kaj ĵetita en la malliberejon. Tiel la civitanoj de tiuj landoj, kiuj aranĝigis kun sia sorto, kiu ŝajnis neŝanĝebla, fariĝis politike indiferentaj kaj cinikaj kaj preferis okupiĝi pri aliaj pli utilaj aferoj, ekzemple kiel vojaĝi al eksterlando, precipe Okcidento (per Eo). Sed oni ne povas tro kritiki la popolojn en tiuj landoj: En 1953 (GDR), 1956 (HU, PL), 1968 (CS), 1981 (PL), 1989 (Baltio) ili provis liberiĝi de la stalinisma komunismo en ribeloj, kiuj estis sufokitaj de sovetiaj tankoj kaj regantoj.¹⁰ Tiun heroecon (kiun la UEA-movado grandparte prisilentis) oni neniam forgesu. La politika propagando de la komunisma bloko, kiun multaj esperantistoj ankaŭ en Okcidento volonte kredis kaj imitis, abunde parolis kaj skribis pri paco kaj socialismo, pri sociaj progre-so kaj justeco kaj amikeco inter la popoloj (vd. precipe la Eo-revuojn *Paco, der esperantist, Bulgara esperantisto* aŭ la agadon de MEM). La Eo-movado volonte transprenis kaj adaptis tiujn propagandajn paradigmojn, skemojn kaj modelojn, kiuj perfekte taŭgis por la propra propagando pri paco, solidareco, amikeco, justeco ktp. por pravigi la propran projekton kaj por ricevi apogon en diversaj landoj. Konklude: La Eo-movado fariĝis, krom de la propra propagando mem, viktimo de la politika maldekstrismo, de kies politike unuflankeca, ne sufiĉe kritika kaj oportunisma politika sinteno ĝi estis subfosita kaj grandparte ruinigita.¹¹

La moderna internacia faka kaj scienca pacologia diskuto (debato aŭ diskurso) traktas vastan spektron de interesaj, aktualaj kaj gravaj temoj, pri kiuj la e-istoj evidente havas neniun ideon, kiujn ili ignoras kaj ne reflektas en siaj pritemaj konsideroj kaj analizoj, ĉar ili ne partoprenas en tiuj debatoj, pri kiuj ili evidente ne interesiĝas.¹² La Eo-movado preferas kuir propan supon aŭ kaĉon, pro kio mankas al ĝi ajna prestiĝo en la „ekstera mondo“, eble krom ĉe kelkaj eŭropaj politikistoj, kiuj interesiĝas pri Eo aŭ lasas sin impresi (por ne diri trompi) de la Eo-propagando, kiu daŭre estas sufiĉe forta, kvankam ĝi atingas nur malgrandan publikon.¹³

Intertempe la pacfanatiko de la Eo-movado eble iom febliĝis, sed ĝi ne malaperis kaj remontriĝas en certaj momentoj.¹⁴ Lastatempe oni iom modifis kaj aktualigis la pacretorikon laŭ la slogano „Monda lingvo por dialogo, ne por milito“,¹⁵ kio verŝajne okazis sub la impreso de la rusa agresmilito kontraŭ Ukrainio en 2022. Estus iluzie kredi, ke ankaŭ la evoluon aŭ solvon de tiu barbara, krima kaj maljusta milito lanĉita de rusaj ŝtataj imperiistoj kaj teroristoj Esperanto povus influi. Male, en Esperanto-medioj regas grandparte silento pri tiu tragika evento,¹⁶ dum en Ruslando mem eĉ ekzistas ankaŭ iuj „oficialaj“ e-istoj, kiuj esprimis apogon al la milita politiko de la landa registaro, evidente por signali patriotisman lojalecon al ĝi, aŭ ili definitive fariĝis viktimoj de la ŝtata propagando.¹⁷ En retaj Eo-medioj cirkulas iu „Listo de honto“ kun la nomoj de koncernitaj rusaj e-istoj, lanĉita de privata pola e-isto.

¹⁰ La tutan historion vd. sub <http://www.planlingvoj.ch/Prago1968.pdf>.

¹¹ Pli detale v. ankaŭ sub https://www.planlingvoj.ch/Kiam_Esperanto_perdis_sian_senkulpecon.pdf.

¹² Vd. https://www.plansprachen.ch/Frieden_ohneEnde.pdf, precipe p. 14-16.

¹³ La nombroj de partoprenantoj de Eo-kongresoj kaj de membraroj de Eo-asocioj ŝrumpas kaj stagnas kaj estas malaltaj, vd. https://www.planlingvoj.ch/Membronombroj_UEA_2021.pdf.

¹⁴ Ekzemple okaze de la Eo-tago, 26 julio 2022, vd. <https://uea.org/aktuale/komunikoj/2022/Mesagxo-de-UEA-okaze-de-la-Esperanto-tago-26-julio-2022-amikeco-kaj-justeco-inter-cxiuj-popoloj>, aŭ <https://uea.org/aktuale/komunikoj/2022/Mesagxo-de-UEA-okaze-de-la-Internacia-Tago-de-Amikeco-30-julio-2022>.

¹⁵ Vd. <https://sezonoj.ru/2022/06/tago-3>.

¹⁶ Escepto eble estas TEJO, vd. <https://www.tejo.org/deklaro-de-tejo-pri-solidareco-kun-ukrainio>, kaj SAT, vd. <https://satesperanto.org/spip.php?article5004>.

¹⁷ Vd. <https://www.liberafolio.org/2022/04/05/la-prezidanto-de-reu-volas-likvidi-ukrainion>, <https://sezonoj.ru/2022/03/reu-7>.

„Esperanto – lingvo de daŭripovo“

Daŭripovo estas ĝenerala nocio, kiu ege modiĝis en la pasintaj jardekoj, kvankam la vorto ekzistis en la germana lingvo („nachhaltig“) jam en la 18a jarcento, precipe lige kun agrikulturo (forsto, ligno).

Daŭripovo estas principo de agado por la uzado de rimedoj (aŭ resursoj), en kiu oni devas garantii konstantan kontentigon de bezonoj, konservante la naturan regeneran kapablon de la koncernaj sistemoj (precipe vivantaj estaĵoj kaj ekosistemoj). Tiu ĉi principo estas semantike rekonebla en la koresponda angla vorto „sustainable“, kiu signifas subteni en la senco de "elteni". Do, la sistemoj implikitaj povas "konstante elteni" certan kvanton da uzitaj rimedoj sen difektiĝi aŭ elĉerpiĝi. La principo estis unue aplikita en la forstado: nur tiom da ligno devis esti faligita en la arbaro, kiom povas konstante rekreski.

Post la dua mondmilito aperis diversaj alisencaj aŭ kompletigaj politikaj konceptoj de la daŭripovo, kiuj variigis, laŭ la pozicio de malsamaj ideologiaj interesgrupoj, la bazan komprenon de la konstanteco (alia vorto por daŭripovo). Kiam en la dua duono de la 20a jarcento la teranoj pli kaj pli konsciĝis pri la fakto, ke ĉiuj krudmaterialoj kaj energiprovizoj en la mondo komencas elĉerpiĝi, la uzo de la koncepto pri daŭripovo vastiĝis al la traktado de ĉiuj vivrimedoj. La moderna, ampleksa signifo de la daŭripovo do estas uzata en la senco de la principo, laŭ kiu ne estu foruzita pli multe ol povas rekreski aŭ esti regenerita kaj disponigita denove al venontaj uzantoj.

La vastigo de la uzado de la termino komence rezultis el la tutmonda medi- kaj evolupolitika debato, precipe per la difinoj de la Monda Komisiono por Medio kaj Evoluo (t.n. Brundtland-Komisiono) starigita de Unuiĝintaj Nacioj en 1983, de la Klubo de Romo kaj de la Enketa Komisiono de la Germana parlamento. La tridimensia koncepto de la daŭripovo, kiu komprenas daŭripovon kiel faskon de ekologiaj, sociaj kaj ekonomiaj celoj en egala mezuro, estis popularigita en koncerna raporto de la Brundtland-Komisiono¹⁸ kaj de la „Tagordo 21“, la fina dokumento de la Konferenco de UN pri Medio kaj Evoluo en Rio-de-Ĵaneiro en 1992.¹⁹

Laŭ plej aktuala kompreno daŭripovo do signifas, ke io povas aŭ devus daŭre ekzisti, efiki aŭ resti longe post kiam ĝi estas/is konstruita, komencita kaj/aŭ ekmov(ig)ta.²⁰

Eble ne mirige, mirinde, kurioze kaj hazarde, ankaŭ en iuj Esperanto-medioj la nocio kaj konceptoj de la daŭripovo estis malkovritaj kun la klopodo apliki ĝin al la bezonoj de Esperanto. Cetere, se mi bone memoras, mi kredas, ke mi legis aŭ aŭdis, ke iuj e-istoj ligis Esperanton kun ekologio kaj konstruis el ĝi ekologian lingvon aŭ simile.

La terminon traktis UEA-prezidanto Mark Fettes okaze de la 102a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo (suda Koreio), kiu havis kiel kadran temon „Turismo kaj evoluo: vojoj al daŭripovo“.

Li diris: „Tiuj pensoj venis al mi kvazaŭ enkonduke al nia ĉi-jara kongresa temo: “Turismo kaj evoluo: vojoj al daŭripovo.” Unuavide tiu temo ŝajnas malproksime de la pensaj kontribuoj de Zamenhof, ĉe kiu oni vane serĉus vortojn kiel “daŭripovo” kaj “ekologio,” ĉar en lia epoko oni ankoraŭ ne elpensis ilin. Pli profunda rigardo tamen montras la grandan kongruon inter lia rezonado kaj tiuj nuntempaj konceptoj. Daŭripovo, ni povus diri, estas nia nuntempa maniero paroli pri ne-entrudiĝemo, tiu zamenhova koncepto, kiun ni retrovas jam en la Unua Libro. Daŭripova socia evoluo estas tia evoluo, kiu reduktas la trudiĝemon de la socio al la ekologiaj kaj kulturaj sistemoj, kiuj vivtenas ĝin. Kaj daŭripova turismo estas tia turismo, kiu

¹⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Our_Common_Future.

¹⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Agendo_21.

²⁰ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Nachhaltigkeit#Begriffsgeschichte>.

celas disvolviĝi konforme al la bezonoj kaj kapabloj de la gastiganta lando kaj popolo, kontribuante al ĝia ekonomia, ekologia kaj kultura bonfarto.”²¹

Bone, la apliko de la daŭripovo en la turismo oni ankoraŭ povas kompreni. Sed kiel ĝi estu rilatigita kun Esperanto kaj adaptita al ĝi? Okulfrapas la frazo: „*Daŭripovo, ni povus diri, estas nia nuntempa maniero paroli pri ne-entrudiĝemo, tiu zamenhova koncepto, kiun ni retrovas jam en la Unua Libro.*” Do, la ponto inter daŭripovo kaj Esperanto estas aŭ estu la ideo de la „ne-entrudiĝemo“, kiu estas komprenata kiel specifa Eo-koncepto. Sed kion tio konkrete signifas aŭ signiflu lige kun daŭripovo ?

En alia kazo Fettes, profesoro pri edukado en kanada universitato, parolis pri daŭripovo lige kun la ĉeftemo de la 107a UK en Montrealo (Kanado), kiu traktis la problemojn de la indiĝenaj lingvoj.²² La ideo kaj logika ligilo estas travideblaj: Se la indiĝenaj lingvoj strebas al daŭripovo, ankaŭ Esperanto povus fari tion. Fettes: „Debatoj pri la protektado kaj subtenado de minoritataj lingvoj plej ofte disvolviĝas surbaze de homrajtaj konsideroj. Lingvo estas konsiderata kiel integra parto de nia identeco, rimedo por disvolvi niajn rilatojn kun aliaj, esprimilo de niaj sentoj kaj kredoj, kaj kanalo por nia partopreno en kulturo kaj socio. Tiuj konsideroj estas evidente validaj por ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, buŝaj, skribaj, kaj gestaj.“ Ktp. ktp.²³ Ŝajnas, ke la aŭtoro volis mesaĝi, ke tiu tuta vero validas ankaŭ por Esperanto. Ĉe tia prezento tamen ne estas klare, ĉu Esperanto estu traktata nun en la kategorio de (savinda) minoritata lingvo en la senco de indiĝenaj lingvoj ? Tia percepto de la afero ŝajnas esti iom kurioza, eĉ erara kaj danĝera, ĉar el la vidpunkto de la originalaj ideoj ĝi povus konduki al grava miskompreno, kiun la Eo-movado certe volus eviti, nome rezigni pri la (memproklamita) statuso de Eo kiel universala lingvo. Krom tio ne estas tre verŝajne, ke Esperanto iam estos agnoskita kiel etna aŭ inidĝena minoritata lingvo.

Dum KAEST 2020 Fettes denove parolis pri daŭripovo en jena kunteksto:

„Antaŭ kvin jaroj, ĉiuj ŝtatoj de la mondo konsentis kunlabori por realigi la Celojn por Daŭripova Evoluo de Unuiĝintaj Nacioj. Por mezuri nian progreson (aŭ malprogreson) al tiuj celoj, necesas sisteme kolekti amason da datumoj pri multegaj aspektoj de homaj socioj. Tamen la ekzistantaj datumkolektaj sistemoj de registaroj, neregistaraj organizoj (NRO-oj), ktp. estas nesufiĉaj al la bezonoj.“ Laŭ la opinio de Fettes, „per engaĝo de multaj ordinarnaj homoj en retoj de t.n. “civitana scienco” eblas kompensi tiun mankon kaj samtempe disvastigi komprenon pri daŭripovo, kiu estas pli aktiva kaj konkreta; kunlaboro en tia aliro povus bele kongrui kun la kulturo kaj valoroj de esperantistoj“.²⁴

La temo dume fariĝis unu el la plej ŝatataj en Esperanto-medioj. Ekzemple ĝi estis kadra temo dum la 99a Germana Esperanto-Kongreso de la jaro 2022, dum kiu estis prezen-titaj prelegoj pri plej diversaj aspektoj rekte ligitaj kun daŭripovo.²⁵ Eĉ pli grave: La elekto de la temo daŭripovo evidente ebligas al Esperanto-organizantoj ricevi EU-subvenciojn el la kaso de la Erasmus-programo, kiel klarigis la raportisto Ulrich Brandenburg, prezidanto de GEA.²⁶ Laŭ artikolo de la germana gazeto *Zeit* Brandenburg ŝajnas vidi ian kongruon kun daŭripovo ĉe Esperanto en „la principo de Esperanto, ke ĉiu kulturo kaj ĉiu lingvo havas egalan valoron kaj Esperanto estas uzata kiel facile lernebla lingvo por interkompreniĝo.“²⁷ Do, la temo de la

²¹ Vd. https://revuoesperanto.org/parolado_fettes.

²² Vd. <https://sezonoj.ru/2022/02/montrealo-17>.

²³ Vd. <https://uea.org/teko/IKU/2019/Fettes>.

²⁴ Vd. https://tubaro.aperu.net/v/yrb_sv-D52r4thU.

²⁵ Vd. <https://www.esperanto.de/de/enhavo/gazetaro/artikoloj/g%C3%A4ste-aus-neun-l%C3%A4ndern-bei-esperanto-kongress-oldenbourg-oldb-fr-3-mo-6>.

²⁶ Vd. <https://sezonoj.ru/2022/07/germanujo-7>.

²⁷ Vd. <https://www.zeit.de/news/2022-06/02/deutscher-esperanto-kongress-zu-nachhaltigkeit>. (Ankaŭ en ĉi tiu primitiva raporto, kiu ripetas la eterne samajn mitojn kaj legendojn pri Eo, okulfrapas, ke Zamenhof ne estis prezentita kiel judo. Ŝajnas, ke oni povus verki 100 librojn pri la judo Zamenhof por poste konstati, ke lia judeco daŭre ne estas menciita. Krom tio la aserto, ke la lingvo Esperanto estas supektata de totalismaj regimoj, estas misgvida: Tio eble validas por la stalinisma

daŭripovo videble povas esti aplikita en plej diversaj kunteksto, sencoj kaj rilatoj. Vivu la (dubinda) interpretado!

Sed la kompreno de „Esperanto kiel daŭripova lingvo“ evidente ankoraŭ ne estas tute matura, kvankam prezenti ĝin laŭ tiu aspekto povas esti tre alloga por la Esperanto-propagando. Sed krom nebulaj imagoj kiel ligi Esperanton kun daŭripovo multe da konkreta substanco ne ekzistas. Laŭ mi oni ne forlasu la originajn pravigojn de Esperanto kaj evitu inventi novajn absurdajn interpretojn, mitojn kaj legendojn, kvankam Esperanto sendube bezonas adapton al la novaj realoj de la 21 jarcento, en kiu Esperanto ne plu aperas kiel grava temo. Ŝajnas, ke per la ideo de la daŭripovo oni celas mesaĝi, ke Esperanto restis aktuala afero kaj estas daŭre uzebla, uzinda kaj uzenda. Sed nur aserti enkonduki Eon kaj vi havos daŭripovan lingvon ne povas servi kiel konsiderinda argumento.

En la esperantlingva versio de Vikipedio (kies enhavo grandparte estas nur resuma kaj fragmenta) oni trovas malmulton utilan pri daŭripovo de Eo kaj legas nur jenan kuriozan frazon: „En la nederlanda gazeto *Trouw* aperis frontpaĝe artikolo pri la Esperanto-movado en kiu F. Gobbo [itala lektoro pri interlingvistiko kaj Eo en la amsterdama universitato] diris ke estas defio nuntempe utiligi lingvon kia Esperanto por strebi al justa ekonomio, ĉar kapitalismo por tiu ĉi planedo ne estas daŭrebla sistemo.“²⁸ Laŭ mi la kontraŭ-kapitalisma faktoro ne plu devus ludi rolon en la traktado kaj konsiderado de Esperanto, ĉar tiun devion oni konas el malnovaj tempoj, sed ŝajnas, ke certaj e-istoj, kiuj serĉas novan mondordon, daŭre ŝatas ĝin. La kapitalismo-kritiko estas tute alia sfero kaj ne devus esti ligita kun Esperanto, ĉar laŭ mi ekzistas nenio komuna inter ambaŭ temoj (kaj la ideo pri Esperanto kiel lingvo de la komunisma eston teco mortis).

Se temas pri daŭripova agado necesus diskuti ankaŭ pri daŭripova kunlaboro kun Afriko. UEA kaj kelkaj individuaj e-istoj havas sperton pri kunlaboro kun afrikanoj. Sed ĉi tie ne temas pri la tradiciaj strategioj investi monon, sed pri serioza profesia kunlaboro for de ĉia e-ista naiveco, kiu estas ankaŭ celo traktita en la internacia debato kiel helpi al kaj kunlabori kun afrikaj landoj – for de la tradicia evoluhelpo (kiun kelkaj fakuloj konsideras fiaskinta kaj senutila) al la direkto de ekonomia kunlaboro, kiu estas tute alia strategio.

La raporto pri la UN-celoj por daŭripova evoluo de 2021 ampleksas jenajn sferojn: Abolo de la malriĉeco kaj de la malsato, sano kaj bonfarto, altnivela klerigo, seksa egaleco, pura akvo kaj sanitaraj instalaĵoj, pagebla kaj pura energio, homeca laboro kaj ekonomia kresko, industrio-inovacio-infrastrukturo, malpli da malegalecoj, daŭripovaj urboj kaj komunumoj, respondeco en la konsumado kaj produktado, protekto de la klimato, vivo sub la akvo kaj sur la tero, paco-justeco kaj fortaj institucioj, partnerecoj por atingi tiujn celojn.²⁹ Kiel Esperanto povus ludi iun rolon kaj kie trovi sian lokon malklaras – eble en la sferoj *altnivela klerigo, malpli da malegalecoj, paco-justeco kaj fortaj institucioj*.

epoko precipe dum la 1930aj jaroj kaj por aliaj politikaj reĝimoj (ankaŭ la persekuto de e-istoj sub Stalin fariĝis parto de la mitoj kaj legendoj de Eo, kvankam tiu historio parte ja veras). Kvankam la Eo-movado estis subtenata de la komunismaj reĝimoj en iuj socialismaj landoj – la cirkonstancojn kaj kondiĉojn de tiu „subteno“ mi priskribis en aliaj artikoloj – oni ne forgesu, ke la subpremado kaj persekutado de kritikantoj kaj opoziciuloj de la komunismaj reĝimoj ne ĉesis – ankaŭ e-istoj estis koncernitaj.)

²⁸ En reago al ĉi tiu artikolo F. Gobbo atentigis, ke li ne estas „lektoro“, sed „speciala profesoro“, nederlande „bijzonder hoogleraar“. Pri la kurioza frazo en *Trouw* li siatempe plendis ĉe la redakcio, ĉar li neniam diris tion, kaj publikigis klarigan artikolon en sia privata spaco, vd. <https://federicogobbo.name/homosum/2019/07/22/het-kapitalisme-is-niet-eindig-het-moet-worden-hervormd>. Esence li nur diris, ke en sia aktuala formo kapitalismo ne estas daŭripova por la planedo kaj, ke potenciale Esperanto povas ludi rolon.

²⁹ Vd. https://www.un.org/depts/german/millennium/SDG_Bericht_2021.pdf.

„Interlingvistiko influis aliajn fakojn“

Interlingvistiko kaj esperantologio eble faras la impreson de aparte interesaj kaj specialaj (ekzotaj) disciplinoj, kiuj ebligas starigi eksperimentajn teoriojn kaj okupiĝi pri novtipaj sciencaj kampoj. Tamen, esperantologio kaj interlingvistiko estas laŭ ĝisnuna praktikado esence nenio alia ol sagacaj (pseŭdo)sciencaj instrumentoj (aŭ “armiloj”) de la Eo-propagando, kies celoj estas (‘science’) pravigi (aŭ eĉ pruvi) la laŭdiran superecon de la artefaritaj planlingvoj super la naturaj lingvoj ĝenerale kaj la angla lingvo aparte kaj de Esperanto super aliaj ĝis nun inventitaj artefaritaj planlingvoj (kiel Volapük, Ido, Occidental, Interlingua k.a.).³⁰

La vero estas, ke interlingvistiko (inkluzive de la esperantologio) ne sukcesis reale establiĝi kiel scienca aŭ akademia branĉo de la lingvistiko aŭ sociologio (kiel germanistiko, romanistik, slavistik, sociolingvistiko ktp.) en universitatoj, eĉ se ekzistas „sufiĉe granda nombro de verkoj, kiuj donas superrigardon pri lingvaj temoj aŭ enhavas artikolojn pri Esperanto“, kaj ke „montriĝas, ke la disciplino faras multspecajn kontribuojn al aliaj fakoj“. Sed interlingvistoj mem konfesas, „ke plenrajta funkciado de Esperantologio mankas en universitatoj“.³¹

Interlingvistiko estis/as do tro forte ligita kun la propagando kaj subjektiva pravigo de la „supereco“ de la lingvo Esperanto fare de la e-istoj, kiuj inventis tiun fakon, kaj restis izolita inter la sciencaj fakoj. La okazoj serioze trakti tiun temon kadre de la establitaj fakoj kiel (soci)lingvistiko, sociologio kaj (lingvo)filozofio esence estis maltrafitaj pro la fanatika, sektema kaj propagandeca konduto de la interlingvistoj, kaj la strebo esti serioze konsiderata kadre de la aplikita lingvistiko restis grandparte senrezulta. Ofte okazis, ke la verkaĵoj de interlingvistoj estis ignoritaj ekster la interlingvistiko. Neniu grava universitato disponas memstaran katedron, kie oni povus studi kaj doktoriĝi pri interlingvistiko, la interlingvistikaj programoj en la universitatoj ekzemple de Poznano kaj Amsterdamo estas private subtenataj de la Eo-movado (ESF kaj UEA). Preskaŭ neniu universitata profesorIno-neinterlingvistIno en la mondo sentas sin kompetenta pri esperantologio kaj interlingvistiko kaj deziras okupiĝi pri tiuj fakoj. La supre citita frazo „ke plenrajta funkciado de Esperantologio mankas en universitatoj“ konfirmas la praktikan bankroton de la interlingvistiko post jardekoj de ĉi-koncernaj klopodoj. Universitataj docentoj pri interlingvistiko kaj esperantologio praktike funkcias ĉefe kiel propagandistoj de Esperanto. Pro la manko de scienca substanceco kaj pro la altgrada spekulativa kaj fantazia karaktero de la teorioj, kiujn tiuj fakoj reprezentas, interlingvistiko kaj esperantologio ne povis influi la sciencon kaj restis kondamnitaj al hobia randa ekzisto sen scienca graveco. Nur aserti, ke „interlingvistiko estas nova (revolucia) interdisciplina scienco“ kaj postuli „enkonduku internacian neŭtralan planlingvon (kiel Eon) kaj la lingva problemoj estas solvitaj“ evidente ne sufiĉis kiel sciencaj argumentoj, kiuj volas esti vaste kredindaj kaj agnoskitaj de la *politiko*. La interlingvistoj eble formulis diversajn interesajn ideojn kaj difinojn pri planlingvaj temoj, sed iliaj ideoj kaj teorioj restis, kiel dirite, tro subjektivaj, inventaj, arbitraj kaj malklaraj, aŭ tro alternativecaj kaj estontismaj. Oni ne kapablis establi ĝenerale akceptitan propran sciencon teorion, planlingvan modelon aŭ novan interlingvistikan skolon, kiun oni povus prezenti al la „ekstera“ scienco, kvankam provoj kaj komencoj ekzistis (ekzemple Duliĉenko), nelaste pro tio, ke diversaj interlingvistoj havis diversajn imagojn kaj opiniojn. Krome, la amaso de e-istoj restis indiferentaj al la proponoj de la interlingvistiko, kiu restis limigita al malgranda grupo de scienculoj.

La asertata (lingva) maljusteco en la mondo plej verŝajne ne dependas de la (nesolvita) „lingva problemoj“ (kiu cetere estas sufiĉe nebula kaj arbitra koncepto kaj unuflankece ligita de la e-istoj kun ties kontraŭeco al la angla lingvo). Nu, iuj e-istoj ligas lingvan justecon al (mal-

³⁰ Kvankam, kurioze, la angla lingvo estas ĝenerale konsiderata kiel sufiĉe facila lingvo.

³¹ Vd. <http://interlingvistiko.net/interlingvistiko/esperantologia-konferenco-2022>.

)justa lingva komunikado, lingva diverseco kaj malegaleco inter la lingvoj.³² Povas esti, ke tioj ludas aŭ povas ludi iun rolon. La „lingva problemoj” en la mondo ŝajne estas pli malpli solvita aŭ reguligita per la principo de la plur- aŭ multlingvismo, kiu estas unuope konsiderenda laŭ diversaj landoj.³³

Tiel okazis, ke esence nur e-istoj konsistigis la rondon de la malmultaj “interlingvistoj” kiel ‘scienca bastiono’ de la Eo-movado. Tro longe la interlingvistiko troviĝis sub la monopolisma kontrolo de malmultaj dominaj figuroj, kiuj volis mem influi, difini kaj regadi la aferojn, ignorante ĉian kritikon de interne kaj ekstere, ĉian proponon, ĉian konsilon, sufokante aliajn opiniojn kaj evitante tiklajn (politikajn) temojn. Post ilia malapero oni devas antaŭvidi kompletan kolapson kaj perdon de la signifo de la interlingvistiko.³⁴

Post kiam ŝajne ĉio estis dirita pri planlingvoj, la temo evidente perdis sian aktualecon, ĉar la intereso pri tiu temo draste ŝrumpis kaj nuntempe estas preskaŭ nula, ankaŭ kaj precipe en universitataj medioj, kvankam de tempo al tempo aperas iuj esploristoj, kiuj interesiĝas pri la temo. Interesata (aŭ scivolema) publiko inter la studentaro ne mankas, kaj en Hungario Esperanto servas kiel objekto en la sistemo de ŝtate rekonitaj lingvo-ekzamenoj por akiri universitan diplomon, kio estas almenaŭ menciinda, kvankam tiu opcio perdis sian originan signifon.³⁵ Ĉar ili komprenis la senutilecon de la vojo, kiun la ‘oficiala’ Eo-propagando elektis, multaj interesaj, kapablaj kaj inteligentaj fakuloj en diversaj landoj rezignis pri Eo kaj interlingvistiko kaj forlasis ĉi tiujn terenojn por ĉiam.³⁶

Konklude, la asertoj pri Esperanto kiel „lingvo de paco“, „lingvo de daŭripovo“ kaj „interlingvistike grava temo“ ne plu efikas. La ekzistado de Esperanto limiĝis al la privata sfero eĉ pli draste ol en antaŭaj tempoj, kiam Esperanto estis publika temo. Fine reaperas la demando pri la kulpo. La Esperanto-movado ne kapablis tiri la ĝustajn kaj necesajn konkludojn kaj sekvojn por restarigi la aferon sur pli konstantan, firman kaj aktualan bazon.

³² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Lingva_justeco. Aliaj nee-istaj aŭtoroj traktis „lingvan justecon“ kiel juran problemon, vd. ekz. <https://literaturkritik.de/hamacher-sprachgerechtigkeit-fragmente-einer-neuen-sprache-des-rechts,26139.html>. Verŝajne oni devus prefere paroli pri socia maljusteco kaj lingvaj barieroj en ĝi (lingvaj barieroj ekzistas ankaŭ ene de unu etna lingvo en la uzado inter diversaj sociaj tavoloj), do la temaro estas pli komplika ol la e-istoj kredas. Finfine estas vere, ke la temo de la „lingvaj problemoj“ pli rilatas al juro ol al socio, ĉar la ŝtatoj jure reguligas la lingvan uzadon, dum la socioj mem ne havas problemon kun la aplikado de diversaj lingvoj samtempe, kiel montras la ekzemploj de landoj en Balkanio kaj Kaŭkazo, ĝis kiam centraj ŝovinistoj ruinigis la naturan uzadon de lingvoj fare de la simplaj homoj. Sed en Eo-medioj oni esence interesiĝas unuavice pri la angla lingvo, kies „hegemonion“ la e-istoj kritikas kaj pri kiu ili opinias, ke ĝi estas altrudita al la homaro (dum pri la kruda kaj perforta altrudo de la rusa, ĉina, turka k.a. lingvoj en la koncernaj landoj ili silentas). Kiel dirite, la motivoj de tiu kritiko estas pure ideologiaj.

³³ Nome per lernado de kiel eble plej multaj nacilingvoj kaj pere de triparta lingvoadopta sistemo: loka (unua) lingvo, nacia (dua) lingvo, internacia (tria) lingvo (ekzemple karakalpaka, uzbeka, angla en Uzbekio aŭ sveda-finna-angla modelo en Finnlando). En iuj landoj (kiel Uzbekio) oni estas tiurilate eĉ pli progresema ol en aliaj kiel Francio, Italio, Hispanio aŭ Pollando, kie la centra ŝovinismo de la ĉefa nacio kaŭzis, ke oni „altrudas“ ĉefe la francan, italan, hispanan kaj polan al la civitanoj kaj neglektas la malnovajn lokajn lingvojn, kiuj praktike elmortis, ĉar iliaj parolantoj asimiliĝis (aŭ en antaŭaj militoj aŭ landaj restrukturadoj estis forpelitaj aŭ mortigitaj). Ankaŭ ĉi tie temas pri esence jura problemoj en la kazo de la loka aŭtonomeco; regiona aŭtonomeco pli facile permesas instruadon kaj lernadon de iu „indigena“ lingvo (ekzemple kataluna aŭ sudtirolo), ol se la loka/regiona aŭtonomeco mankas. La lingva situacio en Eŭropo kaj en la mondo estas ege komplika, tiel ke necesas ofte konsideri, analizi kaj distingi unuopajn kazojn.

³⁴ Kelkajn nomojn oni povas trovi sub <https://eo.wikipedia.org/wiki/Interlingvistiko>.

³⁵ Vd. <https://www.liberafolio.org/2021/03/05/cu-la-cina-por-hungaroj-pli-facilas-ol-esperanto>.

³⁶ Pli detale vd. http://www.planlingvoj.ch/13_HIPOTEZOJ_PRI_ESPERANTO_2012.pdf, punkton 8.